Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 19/08/2021 Kvincentkvardekkvara eldono (unua eldono 20/09/2011)**




## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

## Entute 813,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **281,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **227,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **201,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **104,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde decembro 2021)

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER"

(de Mason Stuttard). N.ro 48 de "Por Komencantoj".

GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). En la kanto "La Espero" troviĝas en la unua strofo la longa frazo
"Al la mond'eterne militanta ĝi promesas sanktan harmonion".
Ĝi estas nekompleksa frazo. Diru kiuj estas kaj kiel nomiĝas ĝiaj kvar frazpartoj.

2). En la nekompleksa frazo menciita en n.ro 1), diru al kiu substantivo apartenas la adjektivo "militanta", kaj kio estas la gramatika subjekto de la ago "militi"?
Kaj kiu speco de sufikso estas "-anta" ?

3). Eŭropaj lingvoj konsistas el frazoj, propozicioj, kies partoj kune kreas bildon de iu, aŭ de io kio okazas aŭ kio senage formas bildon de nia ĉirkaŭanta mondo. La diversaj esprimoj kiuj plenigas la bildon havas kvar aŭ pli da malsamaj funkcioj en la bildo, kies funkcioj estas en Esperanto ne pli ol kvar. Du el ili estas necesaj, unu estas necesa ĉe certaj verboj, kaj la kvara konsistas el nenecesaj cirkonstancoj. Kiuj estas la gramatikaj nomoj de la kvar funkcioj? Kaj el kiom da vortoj povas konsisti ĉiu parto, ĉiu funkcio?
Kaj kiuj vortspecoj estas normale la kerno de ĉiu frazparto?
Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 544. *Marcel Leereveld.*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au



## La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.



Esperanta Retradio

Ankaŭ simioj "salutas" unu la alian **14a Augusto 2021**

# " Kiel oni fariĝas ekskomencanto."

La kurso kiu instruas kiel legi, aŭskulti kaj revizii ĉiun tagan Esperanton - Duolingo

## Surhavu vizaĝmaskon.

*Roger Springer*




**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn.

**Artikoloj por AE.** Se vi trovas taŭgan artikolon por AE kaj ne fidas vian Esperantan nivelon, vi povas uzi la aŭtomatan tradukilon de Guglo kaj sendi ĝin rekte al AE *Roger Springer*

***Google Translate*** estas bonega tradukilo por vortoj anstataŭ uzi vortaron. Metu la ligon sur vian ekranon.




*Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917



**KIO aŭ KIU ?** Enmetu unu el la du, pro la respondo:

1). K.. estas tio? - Tio estas donaco al ci.
2). K.. estas li? - Li estas la celtenulo (ĉe pilkludo).
3). K.. estas tiu? - Tiu estas la malantaŭulo.
4). K.. estas ŝi? - Ŝi estas maŝinlaboristo.
5). K.. estas tiu ĉi?- Ŝi estas la subĉefo.
6). K.. estas li? - Li estas Johano Johnson.
7). K.. estas tiu? - Tiu estas mia frato.
8). K... estas ili? - Ili estas miaj fratinoj.
9). K... estas tiuj?- Tiuj estas miaj nepinoj.
10). K.. estas li? - Li estas plumbisto.
11). K.. estas tio? - Tio estas nova membro.
12). K.. estas tiu? - Tiu estas mia frato.
13). K.. estas lia nomo?- Li nomiĝas Henriko.
14). K.. el tiuj nomoj estas lia?- Tiu estas lia nomo.
15). Ĉu li nomiĝas Henriko?- Jes, t.. estas lia nomo.
16). K... nomon el la tri ci preferas?- Mi preferas tiun (el/la tri)
17). K.. estas ŝi? - Tio estas la reĝino de Britio.
18). K.. estas ŝi? - Tiu estas reĝino Viktorino.
19). K.. staru en la mezo?- Tiu staru en la mezo.
20). K.. estas tiu en la mezo?- Tiu estas la kapitanino.
21). K.. estas tiu libro? - Ĝi estas vortaro.
22). K... el la libroj ci aĉetos?- Mi aĉetos tiun (libron).
23). Sur k.. ci sidas? - Mi sidas sur kuseno.
24). Kun k.. ci manĝis? - Mi manĝis kun miaj gepatroj.
25). Por k.. li studas? - Li studas por teĥnikisto.
26). Kiel k.. ci laboras? - Mi laboras kiel bankisto.
27). Kiel k.. ci ludos? - Mi ludos kiel celtenulo.
28). Kiel k.. ĝi aspektas? - Ĝi aspektas kiel ĝia patro.
29). Kiel k.. ŝi aktoras? - Ŝi aktoras kiel Reĝino Viktorino.
30). Jen novveninto; k.. estas ŝi? - Ŝi estas la kuiristino.
31). Jen kvar virinoj: k.. estas cia patrino?- Tiu ŝi estas.
32). K.. estas tio? - Tio estas mia fratino.
33). K... li faras? - Li faras kadrojn.
34). K.. li estas? - Li estas kadrofaristo.
35). K.. estas lia nomo?- Lia nomo estas Johano.
36). K.. li estas? - Li estas Johano Peters.
37). K.. ŝi volas fariĝi?- Ŝi volas fariĝi flegistino.
38). K.. ŝi estas? - Ŝi estas fraŭlino.
39). K.. ŝi estas? - Ŝi estas fraŭlino Johnson.
40). K.. ŝi volas fariĝi?- Ŝi volas fariĝi Sinjorino Peters.

La respondoj aperos en A.E. proksiman semajnon. *Marcel Leereveld*.

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

# MESAĜO DE UEA OKAZE DE LA INTERNACIA TAGO DE LA INDIĜENAJ POPOLOJ DE LA MONDO, 9 AŬGUSTO 2021

Okaze de la Internacia Tago de la Indiĝenaj Popoloj de la Mondo, la 9-an de aŭgusto 2021, Universala Esperanto-Asocio salutas Unuiĝintajn Naciojn, la Altan Komisionon de UN por Homaj Rajtoj, Uneskon kaj ĉiujn indiĝenajn popolojn tra la tuta mondo.

La Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj, ankaŭ tradukita en Esperanton, agnoskas la homajn rajtojn kaj fundamentajn liberecojn de indiĝenaj popoloj, kaj ankaŭ la rajton al memdeterminado, aŭtonomio kaj memregado. Grava parto de tiuj rajtoj estas la konservado, revivigo kaj evoluigo de iliaj lingvoj, kulturoj, tradicioj kaj institucioj. Ni memorigas la Ŝtatojn pri la sindevigoj sekve alprenitaj kaj samtempe atentigas pri la rolo de la civila socio en la realigo de la Deklaracio.

Nuntempe oni ja konscias pri la graveco de diverseco kaj pri la ligo inter kultura diverseco kaj biodiverseco. Ofte la indiĝenaj scioj ludas gravan rolon en konservado de biodiverseco. Ankaŭ per siaj lingvoj, indiĝenaj popoloj estas la portantoj de valoroj kaj praktikaj konoj, kiuj montras kiel homaj socioj povas kunvivi harmonie kun la naturo. Tio estas alia plia kialo, por ke indiĝenaj popoloj havu plenan povon decidi pri tio kio efikas sur iliaj landoj, akvoj kaj komunumoj, en la kunteksto de la harmonia kunvivado de ĉiuj vivantoj sur nia planedo. Ĉiuj popoloj estas egalaj en sia homeco.

Respekti, konservi kaj evoluigi la diversecon, kaj trovi bonajn manierojn interkomunikiĝi, interkompreniĝi kaj interkunlabori formas la bazan ideon de Esperanto, kiel lingva kaj kultura fenomeno. La internacia lingvo Esperanto ne celas forigi la lingvojn de la unuopaj komunumoj sed faciligi interkomunumajn kontaktojn, dum ĉiuj lingvoj rajtas evolui ene de siaj propraj teritorioj. En tiu senco, la parolantoj de Esperanto defendas la lingvan kaj kulturan diversecon, kontraste al la tro ofta praktiko de la grandaj naciaj lingvoj, kies parolantoj ja okupas pli kaj pli da spaco koste de pli malgrandaj lingvoj.

La de UN kaj Unesko proklamita **Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj komenciĝos la 1-an de januaro 2022.** Nia Asocio elektis kiel temon de la Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo 2022 la temon "Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj". La Kongreso estos unu el la internaciaj aranĝoj, kiuj helpos lanĉi la Jardekon por la periodo 2022-2032. Festante la Internacian Tagon de la Indiĝenaj Popoloj de la Mondo 2021, ni anoncas nian fortan subtenon de la Jardeko, kiu formos okazon por festi kaj firmigi la kulturan kaj lingvan diversecon, antaŭenigi inkluzivigon kaj homajn rajtojn, kaj konstrui pacon kaj evoluigon. Sendis *Katja Steele*

## SOLVO DE LA KVIZETO 48

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



1). "ĝi" estas la Subjekto. "promesas" estas la Predikato (verbo). "sanktan harmonion" estas la Objekto. "Al la mond'eterne militanta" estas Adjekto.

2). La adjektivo "militanta" apartenas al la substantivo "mond'"
kaj la gramatika subjekto de la ago "militi" estas "mond'".
La sufikso "anta" estas "(aktiva) participo".

3). La gramatikaj nomoj de la kvar funkcioj de frazpartoj estas: "Subjekto", "Predikato", "Objekto", kaj "Adjektoj". La nombro de vortoj en frazparto estas nelimigita.
La kernvortoj estas normale por la Subjekto "Substantivo"; por la Predikato "Verbo"; por la Objekto "Substantivo"; kaj por la Adjektoj AŬ "Adverbo" AŬ "Prepozitivo".

. *Marcel Leereveld.*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

**Nur la Ĉefministro havas la rajton decidi fari militon**. Ne la parlamento
Estas grava ke Aŭstralianoj sciu ke Aŭstralio povus militi laŭ la kaprico de Ĉefministro.

## PM Gough Whitlam hejmigis niajn militanojn el Vietnamujo

sen la permeso de Usono, do li perdis sian postenon neatendite. The forgotten coup - how America and Britain crushed the government of their 'ally', Australia (johnpilger.com)

## La Ĉefministro kaj la Ĉefsoldatoj de Aŭstralio fuŝe agis.

La okazaĵoj en Afganujo montras ke ili ne povas organizi ian ajn taskon je la nivelo de siaj postenoj. Ili forgesis la afganojn kiuj helpis niajn soldatojn je personaj riskoj. Kiam niaj soldatoj eliris Afganujon estis inteligenta oportuno por savi niajn amikojn. Nun 350 aŭstraliaj militistoj (kun pafiloj) reiras por korekti la erarojn de siaj gvidantoj.
Ne gravas, la gvidantoj ne riskas siajn vivojn.



**Kaj** forgesis la Vietnaman fiaskon. (bildo)
Dio helpu nin!

**La Afganoj voĉdonas per siaj piedoj. Ĉar ili ne deziras pli da milito, ia paco estus preferata al 20 jara milito. Do ili ne batalis kontraŭ aliaj Afganoj.**
Usono elspezis 2 miliardojn da dolaroj en Afganujo - kaj por kio?
*Roger Springer*

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Universala baza enspezo (UBI)

**Por pli kontentiga kaj sekura mondo**



**3ZZZ** En la elsendo de la 16a de aŭgusto 2021 estas raporto pri moderna teknikaĵo kiu permesas al pro akcidento mutigita persono paroli, kelkaj movadaj informoj kaj priskribo de kutimo, kreita de la neceso por kapitalismo ĉiam proponi novajn “dezirojn”.



*Franciska Toubale*

*Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE*